

Eta raporto de la ILEI-konferenco en Ranzan, Japanio, 11 - 19 aŭgusto 2007.

de Gunnar Olsson, Skövde

Proksimume 70 personoj partoprenis tiun ĉi kongreson kaj krom mi ankaŭ partoprenis Wim Posthuma el Svedujo. Ĉefaj organizantoj estis Tiekō Isikawa plus Yas Kawamura, Japanio, Aida Ĉz'ikaité, Litovio, kaj Zsófia Kóródy, Germanio.

Ranzan estas malgranda urbo situanta en valo inter montoj. Eble mi povus nomi ĝin pitoreska kun nur unu ĉefa strato kaj malgrandaj domoj kun ĝardenoj. Iu diris ke estas la plej varma loko en Japanio kaj la termometro foje indikis 40 gradojn. Ankaŭ eblas atingi la urbon per trajno, kion iuj preferis. Ni loĝis bone, laŭ mi, en domkomplekso konstruita por ia virina movado, kie ni ankaŭ povis aĉti manĝaĵon.

Ranzan situas sufiĉe proksime al Yokohamo kaj mi elektis veturi per luita buso de la UK-a kongresejo. La buso tiel pleniĝis de diversspecaj bagaĝoj ankaŭ ene de la buso ke por kelkaj apenaŭ restis sidlokoj. Dum la unuaj vojaĝhoroj ni vidis nur domojn tute proksime al la vojo. Eble la vojaĝo daŭris kvar horojn kaj nur kiam ni proksimiĝis al Ranzan ni povis vidi ion de la naturo kaj la lando. Ni vidis rizkampojn, (sekajn) riverojn kaj montojn dense kovritajn je verdaj arboj. Tre bela lando!

Okazis pluraj seminarioj pri variaj temoj. Marija Jerkoviĉ parolis pri kroataj verkistinoj en esperanta kulturo kaj Terezija Kapista prelegis pri Esperanto - lingvo de paco. Lucille Harmon montris la DVD-kurson "Pasporto al la tuta mondo".

Zsófia Koródy plurfoje parolis pri diversaj temoj. Ŝi ja loĝas en Herzberg kun la epiteto "La Esperanto-urbo", kiun ŝi prezentis per belaj fotoj. Ili eldonas turismajn broŝurojn en pluraj lingvoj. Herzberg ofertas multajn eblecojn lerni kaj progresi en la lingvo Esperanto. Venontjare ILEI intencas kongresi en Benino (Afriko) kial ŝi rakontis pri studvojaĝo tie.

Wim Posthuma rakontis pri Esperantogården, instruis dancon kaj rezentis la svedan kaj la nederlandan lingvojn dum la Lingva Festivalo. Multaj lingvoj prezentiĝis dum tiu programero. Du etaj gefratoj, knabino 12-jara kaj knabo 13-jara, montris sian nekredoblan kapablon kalkuli enkapo tre komplikajn nombrojn fulmrapide. Laŭ Kikie Markarian tio eblas dank al la sorobano, kion ŝi ankaŭ instruis al ni.

Ni povis lerni paperfaldadon, floraranĝon kaj sperti teceremonion. Multaj virinoj kaptis la okazon provi kaj fotiĝi en kimono, kiu ankaŭ troviĝas en vira modelo. La kutima manĝvespero, al kiu multaj kontribuas per manĝaĵo kaj trinkaĵo, estas interesa programpunkto.

Hori Yasuo kolektas instrumentojn, aĉetitajn ankaŭ dum eksterlandaj vojaĝoj. Li montris sian kapablon trakti ilin en gaja maniero, kantis kaj eĉ montris kelkajn popoldancojn vestite en kimono. Yas Kawamura ludis gitaron kaj kantis en bosa-novaritmo.

Mi partoprenis ĉiujn busekskursojn ofertitajn. En 1999 Unesko registris Nikko-n Monda Kultura Heredaĵo. La ekskurso tien estis tuttaga kaj ni vizitis la renomajn templojn. Al Kawagoe (ankaŭ temploj) kaj Ogawa la ekskursoj daŭris duontagojn. En Ogawa oni faras paperon laŭ tre antikva maniero, troviĝas muzeo kaj vendejo de artaĵoj.

Plej interesa, por mi, estis promeno en la regiono, kie ni povis lerni pri la naturo. I. a. vivas tie tute rara papilio en la arbaro, kiun ni tamen nur povis vidi en la muzeo. Ĉie en Ranzan ni aŭdis la fortan zumadon de cikadoj kiuj troviĝas en tri grandecoj kaj specioj. Tiu Hori Yasuo bonege konas japanan naturon kaj detale klarigis al ni fremduloj. Ĉiuj arboj en tiu regiono estas foliarboj - tre verdaj kaj freŝaj.

RESUME: La ILEI-konferenco estis bone organizita, ofertis multe da programeroj en interesa kaj malgranda urbeto. Mi ĝojas esti partopreninto de tiu aranĝo.
Gunnar Olsson, Skövde